


# LA JUNARO VIVO



## MONATA ORGANO POR LA JUNULARO, INSTRUISTOJ, KAJ AMIKOJ DE LA JUNULARO

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.

ĜIRONUMERO 392363. • JARABONO 2,50 NED. GULD. AŬ EGALVALORO

### ĈU SENDANGERA AŬSTRALIO? (daŭrigo).

Atentu ankaŭ pri la saltformikoj. Malgrandaj ili estas, sed ili tre dolorige mordas.

Sendube vi aŭdis pri la tiel nomataj „blankaj formikoj”, kiuj efektive estas termitoj. Apud la urbo Darwin mi konstruis verandon al mia tendo. Bele konstruita ĝi estis el bambuo kaj palmligno. Tamen aŭdis pri ĝi la termitoj kaj el ĉiuj direktoj ili marŝis, marŝis, marŝis.

„S-ro Halls konstruis novan verandon”, ili flustris unu al la alia. „Ni gustumu ĝin. Venu ĉiuj al la festeno! Ĝi estos senpaga.”

Ŝajne ili organizis laborvicliston, ĉar kiam unu grupo ĉesis labori, alia grupo komencis: manĝ', manĝ', manĝ', tra la tuta tago kaj la tuta nokto senĉese, senhalte ili manĝegis ĝis sateco kaj tiam denove manĝadis. Vere, kia festeno! Dum la silenta nokto, kiam aliaj estaĵoj dormis, ili mordetis la molan palmlignon kaj la malmolan bambuon.

Iun tagon, du monatojn post kiam mi finkonstruis mian verandon, amiko el alia tendaro vizitis min.

„Nepre vi devas rigardi mian memkonstruitan verandon,” mi diris fiere.

„Ĝi ja estas bela,” li admiris post kelkminuta rigardado. „Kaj ĝi aspektas ankaŭ tre fortika.”

Tion dirinte, li apogis sin kontraŭ ĝin, kiam ..... ho ve! ..... mia bela laŭdinda strukturo disfalis en fragmentojn kaj polv nubon. Malbenindaj termitoj!!!

Ĉu mi jam priskribis skorpiojn? Ĉu ne? Do mi tion faru. Eble vi havas tiajn en Eŭropo. Timigaj estaĵoj ili estas kaj iomete similas kankrojn kun grandaj pinĉiloj tenataj antaŭen kaj longa pikhava vosto kurbe super la dorso. Venena, la piko estas doloriga, sed ne mortiga. Strange, ili ŝajne ŝatas loĝi en botoj kaj ĉiumatene ni devis skui niajn botojn por eviti skorpion pikon. Dumnokte ni klare povis aŭdi ilin brurampantaj sur la planko.

Unu matenon mi vekiĝis kaj vidis malbelaspektan verdaĵon volvititan ĉirkaŭ unu el la tendstangoj. Ĝi estis skolopendro, brilverda kaj teruriga. Ni mortigis ĝin kaj laŭ mezuro ĝi estis longa 38 centimetrojn. Unu el miaj amikoj estis mordita de skolopendro kaj devis ripozi en la hospitalo dum tri tagoj. Lia brako terure ŝvelis ĝis la duoblo de la normala grandeco.

Simila estas la dekcentimetra miriapodo, sed malpli danĝera. Kaj la hirudoj! Nevenenaj ili estas kaj oni ne povas senti la mordon, sed ili povas elsuĉi sufiĉe grandan kvanton da sango. La terhirudo kreskas ĝis longeco de 40 centimetroj kaj povas elsuĉi preskaŭ duonan litron da sango. Ili sin fiksas al la suba flanko de folio kaj kiam homo aŭ varmsanga besto preterpasas, ili falas sur ĝin. Ili tiam injektas fluidaĵon nomitan „hirudin”, kio malhelpas la koaguliĝon de la sango kaj samtempe paralizas la nervojn ..... tial oni ne sentas la mordon. La akva hirudo estas pli malgranda kaj troviĝas nur apud malsekaj lokoj.

Ankaŭ en la tropikaj maroj svarmas morto. Krom la ŝarkoj, rajoj kaj angiloj (ĝis 7 metrojn longaj) troviĝas la „Stone-fish” (ŝtonfiŝo) kaj la marvespo. La ŝtonfiŝo estas ege venena kaj estas tiel nomita, ĉar dum ripozo sur la marfundo ĝi tre similas ŝtonon grizan. La dorso estas kovrita per pikiloj, kiuj injektas venenon. La plej fi-fama el niaj mortigaj maraj malamikoj estas la jam menciita mar-vespo. (Latina nomo = meduso). Ĝenerale ĝi flosas iomete sub la supro de la akvo kaj posedas kvar antenojn, kiuj kreskas ĝis unu metro da longeco, kvankam la korpo estas maksimume larĝa nur ok centimetrojn. Oni ne jam scias la kemian enhavon de la injektfluidaĵo, sed kia ajn ĝi estas, ĝi estas tuj mortiga. Ĝi estas pli potenca ol serpenta veneno kaj post kontakto kun marvespo homo mortas en malpli ol tri minutoj.

Ja Aŭstralio estas sendanĝera lando ..... de la besta vidpunkto, sed kiel mi skribis pli frue, ni havas altajn pli subtilajn danĝerojn.

F. Halla, Elaterrwick S 4. Melbourne, Vic., Aŭstralio.

## SOMERVESPERAJ REMEMOROJ.

For el la kontoro ĉe la brua strato en la urbo mi fuĝis hodiaŭ-vespere. Malproksime ĉe la horizonto la lastaj koloroj de la vesperoruĝo radias kaj donas al ĉi tiu belega somera vespero mirigan aspekton. Nur la muĝado de la arboj de l' montaro rompas la profundan vesperan silentadon ĉirkaŭe. Jen sube en la valo vidiĝas la ruĝaj tegmentoj de la vilaĝoj kaj malhele en la malproksimeco fluas la rivereto. Estas ensorĉiga vespero kaj mi komencas revii, rememori pri belaj tagoj, nun jam longe pasintaj .....

Ĉu vi ankoraŭ rememoras, amiko, tiun nokton sur la insulo en Norda Maro? Brilis jam la steloj, kiam ni ellitiĝis kaj migris kune tra la varma somernokto laŭlonge de la bordo. Monotone muĝis la ondoj kaj klakis la akvo al la ligna konstruaĵo, kiu iam estis kajo. Arĝente brilis la luno kaj ĝia lumo respeguliĝis sur la maro briletante.

Ĉirkaŭe, kien ni rigardis, eklumis kaj estingiĝis la multaj ruĝaj, verdaj kaj blankaj lumoj de la turoj, laŭ kiuj la ŝipoj trovas sian vojon. Estis miriga spektaklo ..... Tagiĝis jam, kiam ni revenis kaj ie en la dunoj jam aŭdiĝis la krioj de la mevoj kiel saluto al la nova tago .....

Kaj ĉu vi rememoras tiujn tagojn, kiujn ni travivis, biciklante laŭlonge de la bordo de Rejno? Estis same varma tago kiel hodiaŭ. Urbojn kaj vilaĝetojn ni traveturis tiun tagon. Ni vidis multajn pejzaĝojn en la bela lando ĉe la granda rivero kaj kiam ni haltis en la vespero, ni vidis malproksime antaŭ ni la preĝejajn turojn de Koblenco. Solaj ni estis tiun vesperon ĉe la rivero. Ĉe ambaŭ flankoj verde leviĝis la vinberkampoj kaj la altaj arbaroj ĉe la krute leviĝantaj montaroj aspektis malhele, mistere. Malnovaj ruinoj de ruiniĝintaj kasteloj estis videblaj sur la suproj de la montoj. Kaj la ondoj de la riverego, kiujn ni ĉiam sekvis dum nia veturado, kantis sian malnovan kanton. Kiel fantomboato glitis ŝipo sur la rivero kaj ie eksonis la melodio de malnova popolkanto. Ĉu vi konas la tekston ankoraŭ, amiko?


„Vespero jam ekmalheliĝas, fluadas Rejno en trankvil' ....."

Reneo Mariano.

## T.J.O. KONGRESO. KONSTANZ. (JULIO 28—AŬG. 4. 1950).

Konstanz 1950! Jam tiuj vortoj troviĝas sur la granda verda standardo de T.J.O. Sed ili estas neforigeble skribitaj ankaŭ en la memoroj de la feliĉaj 420 gesamideanoj, kiuj venis el 17 landoj por havi la privilegion ĉeesti.

Pri kio ni plej bone memoros? Certe pri la belegaj ŝip-ekskursoj al la sorĉaj akvofaloj de Rejno en Schaffhausen, al Bregenz en Aŭstrujo kun ties admirinda ŝnur-vagonaro; pri banado en la suno kaj la akvo ĉe la lagobordo; pri kvar diversaj, sed ĉiam ĝuindaj festvesperoj; pri la bela kolor-filmo pri Jugoslavaj dancoj.



Unu el la propagandiloj en Konstanz.

Tiaj distraĵoj tamen, kiel ajn sukcese aranĝitaj, ne certigos pri sukcesa kongreso el Esperantista vidpunkto. Ili estas komunaj al ĉiuj nacilingvaj kongresoj. En T.J.O.-kongreso tamen tiuj sociaj aranĝoj estas fakte la MEDIO POR INTERFRATIĜO; alie ĝi fariĝas nur turisma agentejo kun nepagitaj oficistoj. En Konstanz tiu interkonatiĝo kaj intersanĝo de ideoj ja okazis — kaj grand-skale. Mi aŭdis la karan lingvon ĉie kaj bone uzata. En la Collège Français, kie mi manĝis, oni celis ĉetable sidigi sin inter alilanduloj kaj ŝerce riproĉis: „Ne krokodilu!”, kiam iu parolis nacian lingvon. Mi ne scias, kiu donacis la esprimon al la kongreso, sed espereble ĝi daŭros en nia T.J.O.-vortaro. Ĝi estas tre bonvena.

Ĉi-jare la nivelo de la Esperanto-parolado estis notinde pli alta ol en la antaŭaj kongresoj. Multaj pli ĉeestis la tre valorajn kunsidojn kaj parolis kuraĝe kaj boncele. Tio aŭguras esperplene por nia junularmovado.

En la laborkunsido estis decido, ke la Prezidanto (s-ro Geurts) kolektu de la landaj perantoj kaj de aliaj grupestroj proponojn por estontaj kongresoj. Li kolektos ilin kaj presigos poste en LA JUNA VIVO por nia konsidero. Ili fariĝos kvazaŭ „regularo”

por la helpo kaj gvido de la organizaj komitatoj. Do sendu viajn ideojn al s-ro Geurts aŭ al la TJO-Centro.

Mi finas ĉi tiun skizan raporton per dankvortoj al la laŭdinda Michel Schmidt, kiu, kun la helpo de Alfredo Zeller kaj du-tri aliaj samideanoj, portis preskaŭ la tutan ŝarĝon de la organiza laboro. Des pli triumfa estis lia laboro, kiam oni scias, ke unu monaton antaŭ la kongreso li sukcese trapasis gravan ekzamenon. Dum la kongreso li trankvile gvidis nin tra la labirinto de monŝanĝoj kaj pasportoj, — „kapdoloro”, kiu komenciĝis por li en la fruaj monatoj de la jaro. En malfacilaj cirkonstancoj Michel Schmidt laboris kaj venkis. Se, rezulte, nia TJO-movado plifortiĝos, tio estos lia rekompenco. Kaj tio dependas de vi kaj mi.

Gordon Watson (Anglujo).

**Bildoj serĉataj.** La Loka Organiza Komitato de la 6-a IJK (aŭ: Michel Schmidt) volas kompili belan kaj grandan bild-albumon pri la 6-a TJO-Kunveno. La partoprenintoj, kiuj faris bildojn kiujn ili bonvolas donaci por tiu albumo (kiu estos rigardebla dum la venonta IJK kaj rondiros en la grupoj partoprenintaj) bonvolu **sendi fotojn** pri la IJK aŭ pri partoprenintoj, al Michel Schmidt, Grüngang 9, Konstanz, Germanujo, kiu jam antaŭe dankas. (Jam troviĝas 32 bildoj).

### **KONGRESPROKLAMO de la 6-a INTERNACIA JUNULARKUNVENO de TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO 1).**

Ni, subskribintaj gejunuloj el 17 landoj kunvenintaj ĉe la 6-a Internacia Junular-Kunveno de TJO en aŭgusto 1950 en Konstanz (Germanujo), konsiderante ke la paco troviĝas aktuale en danĝero kaj ke ĝin povas savi nur la veraj pacemuloj en ĉiuj landoj, direktas la jenan alvokon al ĉiuj bonvolaj homoj en la mondo:

1) Ĉiuj homoj konsciu, ke la tutmonda interfrateco, sendiference de diversaj nacioj, religioj, rasoj kaj politikaj konceptoj, estas la nepra bazo por forigi la militdanĝeron kaj konstrui la veran kaj daŭran pacon, al kiu sopiras ĉiu bonvola homo.

2) Ĉiuj registaroj klopodu por reguligi siajn malakordojn pacmaniere. La Organizo de Unuiĝintaj Nacioj (UNO), se ĝi volas konservi la fidon de la pacemuloj, ĉesigu laŭeble perpace la konfliktojn, kiuj nuntempe mortigas homojn en la mondo. La defendo de la paco ne povas esti afero de unu ŝtato, de unu nacio, de unu politika partio, sed ĝi estas vivdemando de ĉiuj homoj en la mondo.

3) Ĉar uzo de internacia lingvo, kvankam nesufiĉa kondiĉo, estas necesa por la monda paco, la adeptoj de la neŭtrala internacia helplingvo Esperanto

1) Unu ekzemplero estis sendata al U.N.


konsideru kiel pacanojn nur tiujn, kiuj eklernos la internacian lingvon aŭ almenaŭ aprobas kaj subtenos la esperantistan idealon.

Ĉiuj pacemaj registaroj subtenu la instruon de la lingvo Esperanto, precipe en lernejoj, kaj garantiu al siaj civitanoj la rajton lerni tiun lingvon kaj ĝin instrui; ili permesu la kontaktojn kaj korespondadon kun la eksterlandaj esperantistoj.

4) La junaj esperantistoj sin deklaras batalantoj por la paco kaj promesas helpi konkrete per siaj plenaj fortoj por la starigo de la paco, vigligante la kunlaboron de plej ampleksaj popolamasoj en ĉiuj landoj.

5) Ĉiuj sinceraj pacemuloj subtenu la pacan laboron de la Esperanto-movado kaj kunlaboru kun ĝi per ĉiuj rimedoj.

Konstanz, la 3-an de aŭgusto 1950.



## I.L.E.I.-RUBRIKO.

(Red. P. Korte, Schoolstr. 13, Veendam, Ned. Centra Informejo: Einar Dahl, Uddevalla, Svedujo).

### Dum la libertempo.

Ĉi-sube ni raportas pri kelkaj gravaj kunvenoj. Pri kelkaj detaloj poste sekvos aliaj informoj.

La I.J.K. en **Konstanz** estis granda sukceso. (Vidu por tio alian artikolon).

En **Angers** (Francujo) kunvenis pli ol 100 Esperantistoj el 12 nacioj. Pli multaj sin anoncis, sed ne povis veni pro financaj kaj limaj baroj. La pli granda nombro estis geinstruistoj.

Regis la konata Angers-a, intima kaj amika sfero, dank' al la senlaca laboro de la organizintoj.

Unu laborvespero por Esperanto en la lernejo, kie parolis f-ino Major (Anglujo), s-ro Morariu (Svedujo) kaj s-ro Korte (Nederlando). Oni akcentis, ke ni forte devos propagandi nian organon „LJV”, por ke ni havu firman internacian kontakton; tia kontakto estos nepre necesa por doni bazon firman al nia instruado de Esperanto en la lernejoj.

Evidentiĝis, ke ne tro granda kunveno havas siajn apartajn ĉarmon kaj avantaĝon.

Kaj nun **Paris**. Tie okazis 4 kunvenoj, kiuj estis treege interesaj por ni, geinstruistoj.

1-e du kunvenoj de nia internacia organizo I.L.E.I.

2-e du kunvenoj de la 1-a sekcio de la U.E.A.-kongreso.

Unue ni raportos pri la I.L.E.I.-kunvenoj: antaŭ la oficialaj, publikaj kunvenoj okazis kunesto de la estraro: f-ino Nixon (Anglujo), prezidantino, s-ro E. Dahl (Svedujo), kasisto-sekretario, f-ino J. Dedieu (Francujo) kaj s-ro P. Korte (Nederlando), komtitatanoj. Ĉiu landa grupo rajtas havi komitatano en la estraro kaj ĉar en la lastaj monatoj germana grupo stariĝis kaj aliĝis al I.L.E.I. kolego Karl Kröber estis elektita kiel komitatano. La listo de niaj reprezentantoj en la diversaj landoj ankoraŭ ne estas finita; ĝis nun ni havas 23 ge-representantojn.

Kiam ĝi estos preta, ni presigos ĝin en LJV. Nia ligo nun havas proksimume 1300 ge-anojn.

La ge-legantoj de ĉi tiu rubriko estas petataj sendi ideojn pri venonta kunveno en München antaŭ la 1-a de marto al nia Centra Oficejo (s-ro Einar Dahl, Uddevalla, Svedujo).

Priparolata estis propono de s-ro Goldsmith, ke ILEI prizorgu liston de lernejoj, kie oni instruas Esperanton. En la komenco de 1951 ni efektivigos tion.

### **Publikaj kunsidoj de ILEI.**

Dimanĉon, la 6-an de aŭgusto kunvenis pr. 60 gekolegoj en komforta salono de Sorbonne. F-ino Nixon malfermas. Ŝi bonvenigas la geĉeestantojn en la unua renkontiĝo de nia Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. En sia malferma parolado ŝi atentigas pri la federacia karaktero de nia organizo. Ĝi ekzistas el lande organizitaj societoj. Kvankam nia ligo estas tute modesta kaj ĝiaj gvidantoj estas tre ordinaraĵoj, kies sidĉambro estas la „oficejo“, fadenoj el multaj landoj tie kuniĝas. Ili kune faras parton de admirinde teksaĵo. Al niaj reprezentantoj la taskon kompletigi tian teksaĵon per interŝanĝo de raportoj, ideoj kaj spertoj. Eĉ unu aŭ du personoj en iu lando, kun fidindaj informoj kaj entuziasmo povas multe kontribui al la valoro de nia organizo. Pli bona estas landa instruista grupo; tie la eblecoj por fruktodona kunlaboro estas pli vastaj. Ekzemplo estas nia franca grupo G.E.E. Por nia informa agado kaj dokumentado al niaj anoj ni bezonas ligilon komunan: ĝi estas „La Juna Vivo“ kun aparta instruista rubriko. La eldonisto, s-ro Muusses, efektive helpas multe al nia lerneja movado.

Kion donas nia ligo? Eniron en profesion organizojn unikan, kies membroj povas disponigi unu al la aliaj la kulturon, teknikon pedagogian, la gastamon de sia lando; kies membroj laboras, por ke ankaŭ iliaj lernantoj posedu nekalkuleblajn avantaĝojn; kies membroj troviĝas en ĉiuj partoj de la mondo, kiuj uzas nur unu lingvon; kies tradicioj estas riĉaj pro la idealoj de tiuj, kiuj uzas ĝin.

Nun k-o Dahl legas salutleteron de la Direktoro de la Eduka Fakto de Unesco. En ĝi estas akcentita la simpatio kun nia movado pro la ĝenerala ideo de la edukado al paco. La direktoro deziras al nia kunveno plenan sukceson. (Eble poste ni publikigos la tutan leteron).

Poste prof. Waringhien parolas kelkajn salutvortojn. El lia paroladeto ni ĉerpas: „Ni troviĝas ĉi tie en la fama Sorbonne, kie antaŭe la internacia lingvo estis la latina. Nun ni kunvenas per Esperanto. Tio ne estas sensignifa. La instruisto havu ĉefan rolon en la propagando de Esperanto, pro sia influo al la gelernantoj. Instruo en junaĝo oni neniam forgesos. Varbado de unu instruisto pli valoras ol tiu de dek aliaj. Sed ni devas atingi la koron de la instruisto. Ekzistas multaj materiaj baroj por li. Multaj vidas en ni pli konkurantojn ol amikojn. Ni devas streĉi niajn fortojn por propagandi persone al niaj gekolegoj pli grandskale ol ĝis nun. Necesaj estas starigo de naciaj grupoj kaj internacia interlerneja korespondado; elmontrado de faktoj al ne-Esperantistoj. Ni bezonas praktikon kaj ne teoriantan agadon de oficialaj instancoj.”

K-o Dahl nun legas sian jarraporton. Li memorigas, ke ILEI aliĝis al UEA kiel kunlaboranta asocio, kaj donas resumon el la raportoj de la landaj reprezentantoj pri la stato de Esperanto sur la lerneja kampo. (Poste en la raporto de la Unua Sekcio ni detale mencias tion). La raporto finiĝas per jenaj vortoj: „Fine ni substrekas la neceson de daŭra kontakto inter la estraro kaj la kolegoj en diversaj landoj. La kampo, sur kiu ni, ĝeinstruistoj, laboras, estas unu el la

plej gravaj rilate al la venko de Esperanto. Ni devas fari ĉion eblan. Eĉ se ni nur malmulte kapablas fari, ni faru tion, konsciante, ke la tuto konsistas el tiaj eroj. Neniu ago estas tro malgranda. Kune ni venkos la malfacilaĵojn kaj kreos la bazon, sur kiu la venkomonumento de Esperanto estas konstruota."

Diskuto sekvas pri kelkaj organizaj aferoj. Kelkaj anoj deziras pritraktadon de iu ĝenerala temo pri pedagogio aŭ speciala fako pli ol priparolado de organizaj problemoj. La raportoj povos aperi en nia gazeto. Dahl substrekas tion kaj George atentigas pri nia LJV. Korte respondas, ke la ĝenerala enhavo de la raportoj aperos en LJV, sed ke ni ĝis nun povas disponi nur pri parto, kaj eĉ nur malgranda, de ĉi tiu gazeto. Pli da abonantoj donos al ni pli da spaco, eble eĉ propran organon. Nixon aldonas, ke nia dua kunveno estos plenigata per parolado kaj diskutoj. Por la venonta jaro la estraro atentos pri la aŭditaj deziroj.

La dua kunveno estis dediĉata al prelego de k-o A. Dumarquez (Francujo) pri la temo: „Kiel kreskigi internacian kompreniĝon en la klaso-ĉambro." Lia parolado baziĝis sur la raporto de Unesco, rezultato de unu el la studkonferencoj en 1948 en Ĉeĥoslovakujo, prezidita de s-ro Louis Meylan, profesoro pri edukado en la universitato en Lausanne (Svisujo).. Bedaŭre (kaj tre malfacile fareble) ni ĉi tie povos doni nur etan superrigardon de la problemo.

Kion povos fari la lernejo por doni senton de homkomuneco? Kia edukado donos la volon kaj la scion, kiuj kondukos al internacia kunlaborado? La lernejo devos esti loko, kie la lernanto ne parkere lernas, sed partoprenas malgrandan komunumon. Ne estas afero de la enkonduko de novaj temoj, sed de la animo, kiu enpenetras la lernejon. La geografio, historio kaj la modernaj lingvoj helpas multe al mondscio, sed por kulturi la justecon, toleremon kaj servemon, la personeco de la instruisto havas la plej fortan influon. La studkonferenco akcentas la grandan valoron de interŝanĝo de objektoj, bildoj k.t.p. La moderna historio devas esti prokrastata ĝis la lernantoj kapablos objekte pensu.

Pri fremda lingvo la raporto diras: „Dezirinde estas por UNESCO-landoj lerni la anglan aŭ la francan lingvon, la du UNESCO-lingvojn." Malfacila temo por la konferenco! Kaj la raportisto aldonas: „tia lingva scio bezonas longan kaj profundan studon."

La kerno de la afero estas: En multaj landoj la edukado estas nur en nacia sento. Nova orientado de edukado estas necesa. La lernejo devos sin organizi por enigi la infanojn en socia medio, en spirito tia, ke ĝi estos poste kapabla eniĝi en homa socio kiel monda civitano.

K-o Dumarquez finas per: „Ĉu ni per Esperanto ne povos pli bone atingi la celon?"

La prezidantino diras, ke la raporto ne estas oficiala opinio de UNESCO, sed de la studkonferenco. Ŝi petas diskutojn sur la bazo de propraj spertoj, rilate al ĉi tiu afero.

Pfütze (Germanujo) komprenas, ke la tasko estas malfacila; la komenco devas esti en la klasoĉambro mem, sed kontakto inter infanoj diverslandaj estas nepre necesa. Korespondado en iu fremda lingvo estas tro malfacila. Nur Esperanto povos helpi. Ĝi havas jam en si mem la deziratan internaciecon. Li nur petas ne fari diferencon inter la infanoj; korespondu kun ĉiuj landoj; ne forpuŝu la germanajn lernantojn; tiam oni multe detruos. Li akcentas la gravecon de internaciaj junularkunvenoj.

Kelkaj aliaj kolegoj parolas pri la granda signifo de interŝanĝado inter lernejoj pri desegnaĵoj, metiaj laboroj, veterraportoj k.t.p.

Denis (Francujo) atentigas pri la solvo de la problemo en Francujo pere de



la Freinet-metodo (Presarto en lernejo). Interŝanĝado de lernejaj gazetoj faritaj de la lernantoj mem. La lernantoj faras siajn proprajn tekstojn kaj ili treege ŝatas kontakton kun aliaj. „Ni soifigu niajn infanojn.” En Francujo, Svedujo kaj Nederlando oni jam aplikas la metodon. Baldaŭ ni povos havi nian internacian kontakton per Esperanto-tekstoj. Interŝanĝado estas pli malmultekosta ol per leteroj, ĉar oni povas sendi la gazetojn presaje.

Dedieu (Francujo) aldonas, ke oni povos fari lernolibrojn per kompilado de taŭgaj tekstoj. Unu el la tekstoj oni jam tradukis en Esperanton kaj ŝi rekomendas aĉeti tiun libreton por montri al Freinet, ke Esperanto estas disvastigita. (La libreto titoliĝas: „La eta kato, kiu ne volis morti”. Prezo: unu int. respondkupono. Adreso: f-ino J. Dedieu, 3 rue Arzac, Toulouse (Hte Gar.), Francujo).

Pugno (Italujo) plendas, ke oni ne sufiĉe atentis pri pureco de la lingvo en gazetoj kaj libroj. Precipe por infanoj oni devas esti tre severa en tiu rilato: lingvo kaj stilo tre simplaj kaj gramatike puraj.

Fine oni iom diskutas pri taŭgaj lernolibroj. George atentigas pri la bonaj kvalitoj de la metodo: „Sub la Verda Standardo”.

La prezidantino fermas, petante kunlaboron en la organizaj intereso: por la redaktado de nia gazeto; por la aranĝo de nia venontjara kunveno en München. Tiamaniere finiĝis tre interesa kunesto de diverslandaj gekolegoj, kiuj diskutis sen iu ajn lingva barilo.

(Sekvos la raporto de la kunsidoj de la Unua Sekcio).

P. K.

## Karaj Lernejoj,

Nun la ferioj jam pasis. Ĉu vi multe ĝuis?

Bedaŭrinde neniu el vi sendis verkajon al mi. Ĉu vi nenion havas por rakonti?

La verkajon pri la ferio de Janina Rredra en Polujo ni jam ricevis pli frue. Ŝi do ne verkis pri la lasta ferio. Janina, ĉu vi ankoraŭ tiom multe korespondas?

Ĉu la lernantoj de s-ro Bobek en Turnov (Ĉeĥoslovakujo) jam ree faris botanikajn ekskursojn? De unu el ili, V. Spetlik, mi ricevis belajn desegnaĵojn pri la „Ĉeĥa Paradizo”. Kiom volonte mi vidus viajn montojn kaj arbarojn!

H. Laigre (en Francujo) verkis „rapid-portretojn” (vidu paĝon 520) pri siaj kamaradoj. Pri Puech li diras: „Tre ŝatas la verkadon”. Se tiu Puech lernas ankaŭ Esperanton, li eble volas verki ion por „La Juna Vivo”.

Via gazeto ja nur fariĝos interesa, se vi mem plenigos ĝin!


N. K.

---

Malgraŭ la petoj en LJV kaj la personaj admonoj de la ĉefperantoj multaj ĝis nun ne pagis sian kotizon (kaj ankaŭ ne malmendis la gazeton). Gesamideanoj, komprenu do kiom vi malfaciligas nian laboron! Lastfoje ni urĝe petas vin: **Pagu tuj!**

# NIA VERKILO.

## La sezonoj.



En unu jaro estas ..... sezonoj.  
La nomoj de la sezonoj estas .....

Skribu nun kelkajn frazojn pri ĉi tiuj kvar bildoj de la sezonoj.



1.




2.



3.



4.



La luno sendis radion al ĉiuj hiacintoj sur fenestro-bretoj.

„Ĉu vi morgaŭ volos veni al festeto? Vi veturos per glacia lunradio.”

Al la hiacintoj tre plaĉis tio kaj ili volonte akceptis.

Lunradio iris ankaŭ al florbutiko kaj ĝi demandis al ĉiuj narcisoj kaj tulipoj:

„Ĉu vi morgaŭ kuniros al festeto? Glacia lunradio portos vin.”

„Volonte,” kriis ĉiuj floroj.

La krokusoj kriis per siaj altaj voĉetoj:

„Ĉu ankaŭ ni rajtos kuniri?”

Rapide la lunradio kapjesis kaj tiam ĝi glitis al la korto de farmdomo, kie kreskis galantoj.

„Ĉu morgaŭ en la vespero vi ŝatus iri al festeto? Vi veturos per glacia lunradio”.

Ĝoje la galantoj sonoris: „Jes!”

Ĉiuj floroj faris sian eblon.

La mastrino de la hiacintoj diris:

„Kiom freŝaj estas miaj floroj!”

La homoj haltis antaŭ la florbutiko kaj diris:

„Kiaj koloroj!”

Eĉ la farmistino opiniis, ke ŝiaj galantoj estas tre belaj en ĉi tiu jaro.

Ĉio estis por la festo!

Je la dek unua horo la sinjorino iris al la lito kaj tiam la luno povis komenci.

## Kelkaj rapid-portretoj de miaj kamaradoj.

JAHANNAULT: Tre lerta en kalkularto. Sed vel kia ortografio!  
Ĉiam silenta. Ĉe li mankas ordo.

PUECH: Preskaŭ neniam ridas. Serioze laboras. Tre ŝatas la verkadon.

DUBOIS: Granda kaj fortika, kvankam ankoraŭ juna. Suĉas sian plumingon! Helpema kamarado, sed tre ŝatas ŝerci.

COMBALAT: La plej juna kaj la plej malgranda el la lernantoj de nia klaso. Bone laboras, sed havas strangan inklinon: li tro ofte ridas, eĉ pro la plej eta motivo.

M. DONNAT: Bona kamaradino, sed tute ne komprenas, kiam oni ŝercas, kaj tro facile ekkoleras. Feliĉe, ŝi rapide forgesas kaj poste ridas kun ni.

G. DONISA: Daŭre suĉas bombonojn!

LAURENS R.: Bele kantas la tutan tagon. Absolute ne ŝatas la kalkularton. Helpema kamaradino. Tre agrabla karaktero.

H. Laigre, Francujo (laŭ Freinet—tekniko).

### La birdeto.

Hieraŭ multe neĝis. Nia kamarado Marcelo trovis malfeliĉan birdeton. Li alportis ĝin al la lernejo.

La birdo flugis de la fenestro al la ŝranko, saltis de la ŝranko sur la kamentubon kaj de la kamentubo sur la breton k.t.p.

Ĝi estis tute ne sovaĝa kaj fariĝis amiko de ĉiuj gelernantoj.

Ĝi eĉ saltis sur la kolumon de nia amiko Andreo. Andreo povis marŝi, sed la birdeto tute ne moviĝis!

De tempo al tempo ĝi fermis la okulojn. Ĉu ĝi estis malsana? Ĉu ĝi malvarmiĝis en la neĝo? Ĉu ĝi vivos ankoraŭ longan tempon? Ni ne scias.

Originale kaj komune verkis la junaj esperantistoj de Balaruc les Bains (Hérault) Francujo laŭ la Freinet—Tekniko.

### Ĉu vi scias?

1. Kiel ofte nia koro batas en unu tago? (Ĉu 2000-, 38000-, 120.000-, 2,5 milionfoje?)
2. Kiom da metroj havas la plej alta monto? (Ĉu 6753, 7196, 8884, 9362 m?) (La solvojn vi trovos aliloke).

G. Schaedel, München, Germanujo.

## Mia Ferio.

Dum la lasta libertempo mi korespondis esperante.

Tio eble ŝajnas malmulte — dum du tutaj monatoj — nur korespondi. Sed tiu ĉi korespondado, pli interesa ol libroj kaj gazetoj, estis ĉie, kie mi estis kaj mi memoras pri ĝi dum ĉio, kion mi faras.

Mi povas diri, ke miaj gekorespondantoj estas la plej bonaj amikoj, kvankam ili vivas en diversaj landoj. Mi ekkomprenis, ke ne nur nia lingvo estas komuna, sed ankaŭ diversaj pensoj, lernejoj kaj granda scivolemo por ekscii kiom eble plej multe pri la vivo de geamikoj en Francujo, Ĉeĥoslovakujo, Anglujo, Bulgarujo, Svedujo, Ameriko, Pollando, Svisujo kaj ankoraŭ multaj, multaj ŝtatoj.

Kun granda ĝojo mi sendis al kelkaj landoj bildkartojn de la ĉarma Varsovio. Kaj mia amikino Elisabeth el Londono reskribis al mi leteron kun la bela frazo: ke kompreneble Varsovio kreskas tiom bele, ĉar la plej bonaj sentoj kaj plej noblaj koroj el Pollando konstruas vian ĉefurbon.

Kiam mi post vizito al nia marbordo sendis fotojn kaj priskribon al mia amiko en Virginia, mi ricevis de li tre interesajn mapojn de lia patrujo kun multaj ilustraĵoj.

Mi estis dum la libertempo en „Sankta Monto” kun mia ĉeĥa amikino Lida kaj mi kaptis fiŝojn kun la svedo Carl; kun Otto H. mi promenis sur Buda Ponto en Budapeŝto, kun la gaja skolto Jack laŭ la rava Piccadilly Market en Manchester. Mi estis en la urbo Zaandam, kie somere floras milionoj da tulipoj kaj nun pluvas dum la tuta tago, kiel ĉiam en Holando. Mi estis ankaŭ en la bela, montara Bulgarujo.

Mi estas certa, ke mia libertempo estis tre interesa, kvankam mi korespondis nur esperante .....

Janina Rredra (17-j. lernantino de s-ro Toczyski en la Liceo de Belaj Artoj en Gdynia, Polujo).

## KONKURSRUBRIKO.

### Raportoj:

1. Mi ricevis 15 provojn: 2 el Francujo, 4 el Nederlando, 1 el Aŭstrujo (la unua!), 1 el Ĉeĥoslovakujo, 7 el Anglujo. Ĉiuj estis bonaj kaj mi gratulas la provantojn. Tiu de Kathleen Reed (Bishop Auckland, Britujo) estis bonega. Ŝi trovis 32 vortojn kaj gajnis la premion. Mi treege ĝuas la bildojn sur la skribpapero el Nederlando.

A. Booy.

2. Raporto ne ricevita.

3. Mi ricevis nur du provojn: unu de plenaĝulino el Francujo, F. Belhomme. Ĉar la premia monprovizo celas „lernejajn gejunulojn” mi ne povas rekompenci plenaĝulojn. Do la premion gajnas Dorothy Kilgour (Tinker's Farm, Britujo).

I. G. Robins.

### Novaj konkursoj:

1. (ĝis unujara lernado): Por mi koloroj ĉiam ligas sin kun apartaj objektoj: Ekzemple, „ruĝa” kun „fajro”.

Via tasko estas skribi la nomojn de kiel eble plej multaj koloroj kaj diri, kun kio vi ligas ĉiun.

Sendu vian provon antaŭ la 18-a de oktobro al f-ino A. Booy, 96 Mansell Road, Birmingham 10, Anglujo.

2. (ĝis dujara lernado): El la sekvantaj 22 silaboj faru 8 vortojn, kies signifo estas: 1. Bela sezono. 2. Sin movi en la akvo. 3. Malluma tempo. 4. Dumdorma bildo. 5. Grandega besto. 6. Malgranda besto. 7. Lernejestro. 8. Ekstrema parto de la brako.

e, el, fan, ĝi, ĝo, in, ist, ku, lo, ma, me, na, nik, no, nok, o, ro, so, son, stru, to, to.

Poste faru 4 frazojn. En ĉiu frazo devas aperi du el la ok vortoj.

Sendu vian provon antaŭ la 18-a de oktobro al: s-ro G. Moir, 44 Francis Street, Fulwell, Sunderland, Anglujo.

3. (Por ĉiuj): Skribu mallongan amuzan anekdoton sub la titolo: „La simio, kiu eskapis el la kaĝo.”

Sendu vian provon antaŭ la 18-a de oktobro al f-ino I. G. Robins, 64 Aldridge Road, Birmingham 22B, Anglujo.

**Konkursreguloj:** Skribu klare: 1. vian nomon; 2. vian naskiĝdaton; 3. dum kiom da tempo vi studis esperanton; 4. la nomon aŭ specon de via lernejo; 5. vian adreson. — Via instruisto aŭ unu el viaj gepatroj devas deklari, ke ĝi estas via propra (senhelpa) laboro.

**Premioj por Konkursoj:** Britoj povas ion elekti el la katalogo de la Brita Esperanto-Asocio ĝis la valoro de 2 ŝ. 6 p. por Konkurso I; ĝis la valoro de 3 ŝ. por Konkursoj II kaj III. Adreso: 140, Holland Park Avenue, London W II. En aliaj landoj la premio-gajnintoj devas elekti unu libron el jena listo:

Konkurso I: „Esperanto por Infanoj” (Salomon), legolibro, aŭ „Komuna Kantlibro” (Holmes) kantoj kun muziko.

Konkurso II: „Tejo kaj Ĉerik” (Toms), historietoj, aŭ „Johano kaj Silvio” (Betts) legolibro kun angla vortaro aŭ „Neĝulino” (Grimm) aŭ libro el Konkurso I-listo.

Konkurso III: „Kudlago, la malgranda Eskimo” (v. Hichtum), aŭ „Pinokjo” (Collodi) aŭ „La Nova Testamento” aŭ libro el la listoj por I kaj II.

Kiam vi scias, ke vi gajnis premion, skribu tuj al la Brita Esperanto-Asocio kaj sciigu tion. Elektu la libron, kiun vi preferas.

## T.J.O.-RUBRIKO.

(Sekretariino: Helmi Veldhuyzen, Hoŝ v. Delftlaan  
79, Delft, Nederlando).



La 3-an de aŭgusto okazis la TJO-jarkunveno en Konstanz, en la kadro de la I.J.K. (Ĝeneralan raporton pri la IJK vi trovas aliloke). Oni elektis en la laborkunveno du novajn estraranojn: Helmi Veldhuyzen fariĝis sekretariino kaj Gerbrand Timmerman fariĝis kasisto. Detala raporto pri la kunveno aperos en „La Peranto”, kiun ni eldonos kiom eble plej baldaŭ.

Kiu ankoraŭ havas raportojn, konsilojn aŭ proponojn do poŝtevene sendu tiujn al la nova sekretariejo (vidu supre). Interesatoj (ne-perantoj) petu tie ekzempleron de L. P., ĉar pro la kostoj ne eblas sendi ĝin al ĉiuj anoj.

La nova estraro unuafoje kunvenis en TJO-Centro je la 26-a de aŭgusto. Ankaŭ pri tio aperos raporto en „L.P.”

### T.J.O.-Kunveno en Ommen (Nederlando).

Same kiel en antaŭaj jaroj la Nederlanda Sekcio de T.J.O. organizas somerkampadon. Ĝi okazis en Ommen de la 22-a ĝis la 29-a de julio. Ĝin partoprenis 40 personoj.

La sfero en la kampejo estis bonega, do ni tre ĝuis.

Dumtage ni faris belegajn promenadojn, naĝis, ludis kaj ..... entute: ĝuis.

Vespere ni popoldancis kaj konversaciis pri multaj aferoj.

Ni dankas ĉiujn, kiuj helpis sukcesigi la kampadon kaj esperas, ke ĉiuj denove partoprenu en la venonta kunveno. Do mi diras:

„Ĝis revido, geamikoj!”

Th. Knegt.

La **Petskribo por Esperanto** estas la 2-an de aŭgusto oficiale transdonita al UNO en Lake Success. La Petskribo atingis proksimume 16 milionojn da subskriboj individuaj kaj kolektivaj.

La helpa ĝenerala sekretario Benjamin Cohen (Ĉilio) akceptis de esperantista delegacio kvar albumojn, kiuj enhavas la subskribojn.

Solvoj: 1. 120.000-foje; 2. 8884 m.

# KORRESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

**Britujo:** Instruisto celas interŝanĝon de desegnoj, floroj, fotoj, ktp. kun 8-10-jara klaso en Germanujo aŭ Skandinavujo. Skribu al: Gordon Watson, 588, Whitton Ave. West, Greenford, Middx.

**Bulgarujo:** Nikolaj Dobrev, 17-j., 23 septemvri 37, Nova-Zagora, dez. kor. pri ĉiuj temoj k. interŝ. poŝtm., gazetojn k. aliajn objektojn.

**Ĉeĥoslovakujo:** Jaroslav Matula, oficisto, Srážná 8, Jihlava; kaj M. Čára, Krizová 27, Jihlava, dez. kor. kun gesamideanoj en la tuta mondo.

18-j. ĉeĥoslovakulo dez. kor. kun gesamideanoj en la tuta mondo. Respondo garantiata. Ernest Vesely, studento, Bratislava, Česká str. n-ro 17.

**Danujo:** Studenta Esperanto-Klubo, Kopenhago, dez. kontakton kun studentaj Esp. kluboj ĉie en la mondo. Skribu al Johs. Vesterland—Andersen, Bernstorffsvej 78, Hellerup.

**Finnlando:** 16-j. junulo, Martti Turpeinen, Törö, Nüttyvlakti, dez. interŝ. bele afr. poŝtk. kun la tuta mondo. Certe respondos.

**Germanujo:** La junulargrupo „La Verda Rondo” aranĝos en oktobro liter-vesperon. Skribu k. sendu varbmateriaĵon al K. H. Schneider, Wuppertal-E., Gertrudenstr. 10.

Deziras korespondi: 1. F-ino Magda Rutz, medicina studentino, Hanfhausen b. Speyer/Rh, Bahnhofstr. 30. — 2. F-ino Hedwig Eberle, medicina studentino, Landau/PF, Poststr. 5. — 3. S-ro Wolfgang Missoug, jura studento, Koblenz, Bismarkstr. 8. — 4. S-ro Eugen Bornhofen, jura studento, Oberlahnstein, Wilhelmstr. 25. — 5. F-ino R. Zimmer, filozofa studentino, Monatabaur (Westerw.) auf der Burg (nur kun esperantistinoj). — 6. S-ro H. Josef Paus, filozofa studento, Essen-Borbeck, Weidkamp 171.

**Japanujo:** 14-j. komencanto dez. kor. pri div. temoj. Asano Tasuku, 946 Wada Honcho Suginami-ku, Tokio.

15-j. lernanto dez. kor. k. nederlandaj esperantistoj pri nacia vivo, lernejoj kaj poŝtmarkoj. Satou Ŝigeru, 1-5 Tomisaka Bunkjo-ku, Tokio.

Ni, 40 gestudentoj, anoj de la Esperanto-Rondo de la Kumamoto-Universitato (K.E.R.) studas objektivite la internacian, ekonomian kaj politikan statojn de ĉiuj landoj. Por tio necesas ke ni konu la verajn statojn kaj ke ni interŝanĝu ideojn kaj opiniojn kun ĉiuj landoj de la mondo. Nia adreso: Kumadai Esperanto-Rondo, Kuma dai, Ŝugaku-rjo, Tsuboi-kjokukunai), Kurokami-maci, Kumamoto-ŝi.

**Geedziĝo:** Alois Postl kaj Erika Thurner geedziĝos en oktobro. Adreso Döblich 11, Post Au ĉe Aflenz, Stirio, Aŭstrio.

Pro spacomanko ĉi tiu numero ne enhavas la rubrikojn skoltoj, radio-amatoroj kaj poŝtmarkkolektantoj.